Jaro I—N° 5 * ESPERANTO * Barcelono-Oktobro-1909

# JEN



—Kial vi ŝirmas vin, dum varma Oktobro, per viaj varmigaj vestaĵoj?
—Pro ĝentileco. Mi ĵus ĉeestis paroladon de Cook pri la Poluso.

LA FIRMO

# HACHETTE KAJ Kio

79, Boulevard Saint-Germain

Paris

DECIDIS KLARIGI ĈIUN MISTERON.
TIAL POST LA *MISTERO DE DOLORO* DE A. GUAL, TRADUKITA
:: DE FRED. PUJULÁ, ĜI ELDONIS ::

## *Mistero de Amo'n*

*de Sinjorino N. Kolowrat*

Kiun oni povas havigi al si per 1'25 frankoj

**Saĝaj esperantistoj ne devas legi**

## FRENEZO'n

DE FRED. PUJULÀ

SED ĈIU RAJTAS ĜIN AĈETI PER 1 FRANKO
ĈE HACHETTE MEM KAJ KORESPONDANTOJ

# JEN

## La polvoŝirmilo de sinjoro Mudie

Sinjoro H. Bolingbrooke Mudie faris antaŭkongresan ekskurson. Li vojaĝis al Barcelono tra Lisabono kaj Madrido. En la unua el tiuj ĉi urboj, li konstatis, ke malgrŭ la jam de longe pasintaj tertremoj, la urbo kuŝas en la sama loko kiel ĉiam. En la dua urbo li akiris profundan amon al Hispanujo kaj al ĝiaj homoj kaj kutimoj. Sinjoro Mudie, ano de la movoplena Londono, malŝatas jam de la infaneco la bruegon de la malnova civito. Li malŝatas la senĉesan trairadon de ĉiuspecaj veturiloj, la kubuttuŝojn, la ekpuŝegojn, la rapidiradon, la moviĝadon, la svarmon de la stratoj de la nebuloza Tamiza urbego. Tial, kiam li troviĝis sur la strato de Alcalá, kiam li vidis la toreadorojn, kiuj deĵoras sur la trotuaroj kun la kruroj krucigitaj, apogitaj sur dikaj bastonoj, kun dika horloĝĉeno sur la ventro, ombrodona ĉapelo sur la kapo kaj kiuj kraĉas oblikve tra la flakdentoj; kiam sinjoro Mudie vidis sunon, trankvilon, ripozon, kaj la heroecon de tiuj sur la trotuaro ĉiam deĵorantaj viroj, li sentis sin kortuŝita, kaj en la fundo de sia animo li eĉ bedaŭris, ke Nelson vivis.

Li ne alvenis al Barcelono vestita kiel toreadoro, ĉar li timis, ke la membroj de U. E. A. ne rekonos lin, sed liaj sentoj estis jam bone fiksitaj, kaj kiel bona brito ne sufiĉis al li la idealo: li klopodis tuj realigi, efektivigi, alkongresigi ilin.



LA TREZORO DE LA HUMILULOJ

—Ĉu vi parolas Esperanton?

—Ankoraŭ alia lingvo? Ne; mi estas partiano de la silento.

Tial li tuj proponis, ke sur la prezidantan tablon de la Kongreso oni metu anstataŭ sonorileto unu paron da kastanjedoj, kiujn la Prezidanto devus ludi en la necesaj okazoj. Generalo Sebert aprobis la ideon por kontentigi la dudek du hispanajn esperantistojn aliĝintajn al la Kongreso; sed kiam oni sciis ke tiu muzikinstrumento troviĝas, en Barcelono, nur ĉe malbone estimataj drinkejoj, neniu kongresano akceptis iri tien aĉeti ĝin, kaj la reformeto ne estis bed rinde ebla.

Poste, li vizitis sinjoron Tudó, la elpensinto de «La Rondo» kaj Direktoro de tiuj simpatiaj gejunuloj, kiuj dancis katalunajn dancojn dum la Internacia Balo. Li petis, ke li dancigu hispanajn dancojn: la *boleron,* la *fandangon,* la *sekvidiljon,* la *maĉiĉon,* kaj la *garotinon.* Sinjoro Tudó ruĝiĝis, poste koleris, fine li certigis, ke la fraŭlinoj de lia societo estas plej honestaj fraŭlinoj apartenantaj al plej honestaj familioj. Oni devis klarigi al nia kara amiko Mudie, ke tiuj artoplenaj hispanaj dancoj estas nur dancataj, en Barcelono, ĉe teatraĉoj kaj kunvenejaĉoj. Sinjoro H. Bolingbrooke Mudie, komencis kompreni ke katalunoj estas ne instruita popolo.


Post ĉeesto en taŭrkurado, entuziasmigita de la tre hispana karaktero de la festo, li elpensis reorganizadon de la U. E. A. La interna funkciado estos la sama, kvankam sinjoro Privat jam estas dudekjara, sed la nomado de la membroj tute ŝanĝiĝos. La Konsuloj estos nomataj *matadoroj,* la Delegitoj—*banderilistoj,* la subdelegitoj—*pikadoroj;* kaj tiu, kiu estos nek unu afero nek alia, estos nomata *publiko,* kaj tiel oni solvos la de-




POST LA KONGRESO.

—Kiel ŝajnis al vi la Va Kongreso?

—Bonega! Ĝi tiel multe plaĉis al mi, ke mi decidis ĉeesti la Van Kongreson de la venonta jaro.



KONSULTO

—Sinjoro doktoro, ĉu vi, specialisto pri dermaj malsanoj povus klarigi, kial trafendiĝis tiu ĉi ŝuo?

mandon: «ke ĉiu estu io ajn». Bedaŭrinde, ne ĉiu aprobis la ideon, kaj U. E. A. daŭros, kiel nun.

Sed ĉio ĉi estas bagatelo kompare kun la emociiga afero, kiu okazis al nia amiko ĉe la taŭrkurado, kiun li ĉeestis. Li rimarkis, ke post lerta ludo de la ĉefa toreadoro, ĉiu ĉeestanto ĵetadis sur la arenon ion ajn. Tiu ĵetis la ĉapelon, tiu ĉi la ĉapon; tiu pli proksima ĵetis la ventumilon, tiu pli malproksima la felvinujon. Post ĉiu lerta ludo, pluvo da objektoj okazis de la publikejo al la batalejo; kaj kvazaŭ regule, la toreadoroj reprenadis la objektojn kaj reĵetadis ilin al la posedantoj. Nia amiko kredis, ke tia ĵetado estas deviga al la ĉeestantoj, kaj tuj kiam li vidis ĉevalon flugantan je tri metroj de la tero kaj toreadoron, kiu kuregis helpi la falintan rajdiston, li opiniis necesa ĵeti ion ajn, kaj rapide li demetis sian polvoŝirmilon kaj ĵetis ĝin al la toreadoro. Grandega ĝojo kaj kontentego ĉies sekvis la entuziasmoplenan geston de nia samideano. Ĉiu konas la belan polvoŝirmilon de sinjoro Mudie. Imagu ĝin etendita, malrapide fluganta sur la arenon, kiel nova modelo de aeroplano!.....


Kiam la toreadoro reprenis la vestaĵon, por reĵeti ĝin al nia amiko, la taŭro furioze atakis lin, kaj li, lerte, rapide, inteligente, kun inteligenteco inda de monumento en placo de Madrido, uzante la polvoŝirmilon kiel batalmantelon trompis du fojojn la furiozon de la besto, kaj restadis antaŭ ĝi en plej parada pozo kontraŭ la kornoj nun kvitaj, envolvita en la vojaĝa polvoŝirmilo, salutata de la freneza aplaŭdado de entuziasmigita publiko.

De tiu momento, la polvoŝirmilo de sinjoro Mudie fariĝis glora, glorega, inda je vitraĵo en la *British Mu-*



LA UNA EPOKO

—Mi venas peti, ĉu vi volas fianĉiniĝi je mi.
—Mi petas pardonon. Mi estas tro juna. Bonvola atendi du monatojn ankoraŭ.



—Mi volas memmortigi min kaj venas pruntepeti vian revolveron.
—Vi havos, sed vi redonos ĝin, ĉu ne?



—Ĉu vi deziras manĝi laŭ menuo, aŭ laŭ preparita tagmanĝo.
—Ni preferas manĝi laŭ nia apetito.



—Bone; sed kiel utilos al vi scii la internacian lingvon!
—Mi povos samtempe labori en ĉiu haveno de la mondo.

*seum* de Burgos aŭ Guadalajara. Sed sinjoro Mudie amas tro la hispanojn kaj iliajn morojn por senposedigi sin de tia glora memorajo. Kaj li decidis, ke tuj, kiam li estos reveninte en Londonon, li enkadrigos sian polvoŝirmilon por ĝin ŝirmi siavice kontraŭ la polvo de la jarcentoj.

La Kongresanoj de la Kongreso de Washington, kiuj bedaŭros ne plu vidi sinjoron Mudie kun lia polvoŝirmilo, povas esti trankvilaj. Nia kara amiko posedas aliajn similajn vestajojn.



La V[a] Kongreso estas nomata de multaj esperantistoj la Kongreso de la maldormo. Ĉiu plendis, ke oni ne havis tempon por dormi, kaj ili pri tio kulpigas la organizintojn, kiuj komencigis ĉiun vesperkunvenon je la 11[a] vespere. En tio, oni ne estas prava. Jam de la unua tago oni bonege konis la manieron fariĝi maldormema. Sinjoro João Keating estis ĉiam preta proponi tason da Brazila kafo al ĉiu kongresano!




MALAMO DE RASOJ

—Sed mi ne pardonus ŝin, se ŝi trompus min kun farunisto!

---

La filo de sinjoro Pau Baldruch, membro de la grupo «Fiereco kaj Tranĉileco» estis kongresano, havis kongresan libron kaj kolektis aŭtografojn.

Kun la libro malfermita en la maldekstra mano kaj minaca krajono en la dekstra li sin turnis al la majstro.

— Eminenta sinjoro —li diris— Ĉu vi *deziras* subskribi tiun ĉi paĝon?

— Mi? Tute ne! —respondis la Doktoro.

Kaj la filo de sinjoro Pau Baldruch, membro de la grupo «Fiereco kaj Tranĉileco, restis mirigita kun la fermita libro en la maldekstra mano kaj la krajono en la poŝo.



# Al tiu, kiu legos

Niaj legantoj konas bonege la spritecon, akutecon seriozecon kaj literaturecon de nia estiminda samideano sinjoro Pau Baldruch, kies letero aperinta en antaŭa numero de JEN allogis al nia Administrejo dudek abonintojn kaj duono kun la gratuloj de *Simplicissimus*, *Le Témoin*, *Pick me up*, kaj ceteraj kolegetoj. Kial paroli denove, kial prezenti do, la ageman kaj delikatan ŝufariston de la strato Boquería? Nu; ni havas multe da motivoj por tion fari.

Niaj legantoj certe sufiĉe konas la àrtajn kvalitojn de sinjoro Baldruch, sed ili devas ankaŭ koni la privatajn karakterojn de tiu eminenta viro, kiu tiel sindoneme eniĝis en la vicoj de nia Redaktoraro, forlasis sian propran metion kaj sin donis al la internacia movado kun korpo kaj animo.

Sinjoro Baldruch mirigita de la sukceso de la 5ª jam post la solena malferma kunsido, rapidizis al sia hejmo, kunvokis kunvenon de sia grupo «Fiereco kaj Tranĉileco», kaj klarigis al la membroj (lia edzino, kaj gefiloj) ke li ne plu volas sin okupi pri piedoj, kiam tiom da laboro estas postulata de la kapoj. Kaj tuj li venis al ni proponante regulan kronikon por nia gazeto. Ni akceptis lin plej kore kaj kun promeso de mil spesmiloj por kroniko. Li rifuzis! Ni insistis! Li rerifuzis! Li nur postulis eldonon de sia portreto en ĉiu numero..... Ĉu ni akceptis aŭ ne, tio estas afero nia, kiu ne interesas al la esperantistaro. Nur ni admiru la sindonemon de tiu viro, kiu preferas gloron pli ol oron. Ni scias, ke li koleros, kiam li vidos ke lia portreto ne aperos, sed ni ankaŭ estas certaj, ke lia fervoro retrankviligos lin.

La nervaro de sinjoro Pau Baldruch estas kiel plej eble kvieta. Oni suspektas, ke li ne havas nervaron. Tiu ĉi kvalito ebligos al li okupi en la vivo la plej superajn lokojn. Nenio pli impresas la homojn ol sfinkso, kaj eminenta viro devas esti konstruita nur el viando kaj ostoj. Por montri la kvietemecon de la nervaro de sinjoro Pau Baldruch ni nur devas rememori, ke li trinkis kafon de sinjoro Keating kaj tamen li dormadis senhalte la tutan nokton de la 4ª de Septembro! Ni gratulu nin tial, ke lian kunlaboradon ni akiris; admiru lin, aplaŭdu lin. Gloron al sinjoro Pau Baldruch, al la eksŝufaristo de la strato de la Boquería!


En la lasta momento ni ricevas leteron de sinjoro Pau Baldruch, per kiu li sciigas nin, ke ĉar ni ne eldonas lian portreton en tiu ĉi numero, li prokrastas la sendon de sia artikolo pri la kongreso! Ni profunde bedaŭras la decidon de nia glora samideano, kaj ni petas pardonon de niaj estimataj legantoj!





EN LA INTERNACIA BALO.

—Mi ja suspektas, ke por vidi danci la boleron k



iĉon, ni devos atendi ĝis kiam la Kongreso okazos en Parizo.

Nía kara amiko kaj kunlaboranto sinjoro Pau Baldruch, ŝufaristo de la strato Boquería kaj Prezidanto de la Grupo «Fiereco kaj Tranĉileco» ne plu lavos sian dekstran manon. Li tion decidis havinte la honoron premi la manon de la Doktoro. Ni bedaŭras la decidon pro lia maldekstra mano, kiu nek estas kulpa, nek eltiris gloron de la manpremo.





—La malriĉuloj havas ĉiun privilegion, eĉ tiun de la maldikeco!



KATASTRAFO.

—Ok mortintoj?... (ok... ok... ok fojoj ses, kvardek ok; kvardek ok mil spesmiloj por la asekuro). Kia malfeliĉajo!!!!



—Kia malpurema infano! Li ĉion malpurigas; li nur ĝojas en porka kalsono! Mi ne scias, kio li fariĝos!
—Eble inspiranto de «L'immonde Esperantiste».




—Mi gratulas vin. Mi scias, ke via filo soldato perdis en la milito ambaŭ krurojn. Kiom da ŝuoj li sparos!

**NE ABONU LA GAZETON JEN**

Unu jaro. . . . . . . 3 Fr. (1,200 sm.)
Jarduono. . . . . . . 2 » (0,800 sm.)

Eldonisto: RAMON FARRÉ str. Portaferriça, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la «ĈEKBANKO ESPERANTISTA» Merton Abbey. LONDON SW.)

**REPREZENTANTOJ.**

—G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
—Möller & Borel, «Esperanto Ver'ag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
—Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
—«The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
—Libroeldonejo «Esperanto» — Valovaia, kv. 5.—MOSKVA.

# HUMORO DE L'AVOJ

## KATALUNUJO

Desegnaĵo de T. Padró. «El Mundo Riendo» 1866.



—Se ne estus dio, kiu venas, eĉ dio ne pasus tra ĉi tie.

Desegnaĵo de T. Padró. «El Mundo Riendo» 1866.



—Kiu estas, tiu malriĉe vestita viro?
—Kantisto, kiu faras miraklojn per sia voĉo.
—Do ke li faru al si pantalonon, ĉar li ja bezonas!

Desegnaĵo de T. Padró. «El Mundo Riendo» 1866.



—Kia diabla gusto! Per kio vi filtris la kafon?
—Per ĉi tiu ŝtrumpo; sed ne koleru, ĝi estas mia kaj malpura.

Desegnaĵo de T. Padró. «Un Tros de Paper» 1865.



—Ŝi estas tre ŝparema virino. Imagu, ke por ŝpari sian edzon, ŝi uzas la aliajn.



NE ABONU ANKAŬ

# PAPITU'n

Kataluna satira karikatura gazeto.
Aperas ĉiusemajne.

ABONO :

| | | |
|---|---|---|
| **Hispanlando:** | jarkvarono. | **2** Ptoj. |
| **Fremdlando:** | » | **3** » |

**PELAYO, 35 - BARCELONO**



**Neniu malbona esperantisto legas la**

## "FRANCA ESPERANTISTO„ 'n,

KIUN ONI ABONAS EN

**46, BOULEVARD MAGENTA, PARIS**


# JEN

**akceptas**

# Poŝtmarkojn

**de ĉiu nacio por la pago de l'abono**

Esperanta Presejo de J. Horta.—Méndez Núñez, 3 y 5.—Barcelono.




—Ili jam solvis la demandon pri socia egaligo.